

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Stefan MacGill

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Marija Belošević

Michel Dechy

Bharat Ghimire

Heidi Goes

Mireille Grosjean

Sylvia Hämäläinen

Yinbao Huang

Dennis E. Keefe

Zsófia Kóródy

Emile Malanda

Svetlana Mirošničenko

Germain Pirlot

Derek Roff

Martin Schäffer

Bardhyl Selimi

Enikő Zengő Sereghy

Gizela Sklorz

Magdalena Tatara

Petro Ye



ilei

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Mireille GROSJEAN: <i>Ĉu nova erao? Ĉu plua elano?</i>	4
Mireille GROSJEAN: <i>Pri la Konferenco 2013</i>	5
Marija BELOŠEVIĆ: <i>La Tago de la Lernejo [...]</i>	8
Stefan MACGILL: <i>Edukaj perspektivoj en la Strategia Vizio de UEA</i>	10
Michel DECHY: <i>Prezentado de Esperanto en diversaj francaj lernejoj</i>	11
Bardhyl SELIMI: <i>Instruado de matematiko</i>	13
Rob MOERBEEK: <i>Erarologio aŭ infektaj malsanoj en nia lingvouzo (I.)</i>	14
Renée TRIOLLE: <i>Reformo de la eduksistemo en Rusio</i>	21
Dennis KEEFE: <i>Universitato de E-o, Oriento kaj Okcidento</i>	23
HUANG Yinbao, „Trezo”: <i>Angla lingvo perfortas ĉinajn lernantojn (I.)</i>	25
<i>El la landoj kaj sekcioj (BJ, CN, FI, HU, CD, NP, NI, TL, PL, RU, ZA, UY, US)</i>	29
<i>Forpaso (Hermann Behrmann 1935-2013)</i>	39
<i>Reago (Germain PIRLOT)</i>	40
<i>Informoj pri ILEI kaj nia redakcio</i>	41

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. fiksa (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Kunordigado de la estrara laboro. Informado al la movado (www.ilei.info) kaj al la ekstera mondo. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe la estraro de UEA.

Unua vicprez.: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso fiksaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

Dua vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. fiksa (+ 510) 653 0998.

Sekretario: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. fiksa (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

Vicsekr.: Magdaléna FEIFIČOVÁ „Fejfi”, Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.officejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nespa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro www.ilei-mondo.info, varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford; AdE¹
Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank, Germanio,
Universität Paderborn; AIS²
Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah
Renato Corsetti, Italio, Università degli
Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹
Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian
Statistical Institute, Kolkata; AdE¹
Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas
Wim Jansen, Nederlando, Universiteit
van Amsterdam
Boris Kolker, Usono; AdE¹
Ilna Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama Mickiewicza
w Poznaniu; AdE¹
Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie
Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия
Сельскохозяйственного
Машиностроения
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet
u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Konferencaj fotoj sur la kovriloj

Titolpaĝe supre: *grupo kun flagoj*,
malsupre: *la prezidinto/anto/onto de
ILEI en Herzberg/Sieber*
Dorskovrile supre: *inaŭguro de la ponto
kun du urbestroj (Gerhard Walter kaj;
Reinhard Ahlborn)* malsupre:
frandaĵoj en la unua vespero

Enkonduko

Karaj Legantoj,

post la apero de la antaŭa numero okazis grava ŝanĝo ĉe ILEI: anstataŭ Stefan MacGill (kiu intertempe iĝis la vicprezidanto de UEA) nian estraron prezidas Mireille Grosjean. La aliaj estraranoj restis, sed kelkaj ricevis novajn taskojn (*vidu la 2-an paĝon*).

Nia nova prezidanto kontribuis al la numero ne nur per artikoloj, sed ŝi multe helpis nian revuon ankaŭ dum la redaktado: ŝi partoprenis en la decidoj, korespondis kun la aŭtoroj, reverkis, mallongigis kontribuojn, provlegis.

La nunan numeron karakterizas abunda rikolto el la juliaj kunvenoj kaj simile abunda rikolto el la diversaj regionoj en la mondo. En la rubriko *El la landoj kaj sekcioj* nun aperas 13 landoj, inter ili estas pluraj, pri kiuj oni tre malofte povas legi en nia revuo. Tiuj raportoj el la diversaj landoj instigos vin al pli trafa agado, pli diligenta lernado kaj pli efika instruado de nia lingvo.

Plurajn artikolojn ni devis mallongigi, krome du elstaraj artikoloj povis nun aperi nur duone (tiuj de Rob Moerbeek kaj Trezoro), la daŭrigojn vi povos legi en la 4-a ĉi-jara numero. La samo validas ankaŭ por la prelegoj de la Tago de la Lernejo: la serion ni daŭrigos en la sekva numero.

Bonan legadon!

Jozefo NÉMETH,
redaktoro

Ĉu nova erao? Ĉu plua elano?

Karaj membroj de ILEI, karaj legantoj!



Jen mia unua alparolo al vi ekde mia elektiĝo kiel prezidanto de ILEI, la dua prezidantino. Mi volas unue saluti vin, gratuli vin, ke vi uzas Esperanton kaj eĉ instruas nian karan lingvon.

Dum kvar jaroj s-ro Stefan MACGILL dediĉis grandan energion por vigligi la Ligon, alporti novajn ideojn, adapti la strukturojn de la Ligo cele al pli efika laboro. Ni danku lin elkore. Inter aprilo kaj julio 2013 s-ino Zsófia KÓRÓDY, kiel vic-prezidanto, zorgis pri la ĉiutagaj aferoj ĝis la 46-a

Konferenco en Herzberg-Siebert, Germanio, kiun ŝi elstare preparis kaj gvidis. Ni danku al ŝi elkore. La Komitato de ILEI valide kunvenis dum tiu grava evento kaj decidis transdoni al mi la gvidadon de la Ligo. Mi tre dankas al miaj kolegoj pro la fido kaj subteno.

Mia celo estas plu firmigi la Ligon, etendi la surfacon de ĝiaj sekcioj, kreskigi la membronombron. Plie mi volas subteni vian instruistan laboron per diversaj agadoj; konservi kaj se eblas plibonigi la kvaliton de nia organo *Internacia Pedagogia Revuo*, por ke ĝi estu vera helpilo al via laboro; flegi la kontaktojn kun *edukado.net* kaj *lernu.net*, nemalhaveblaj retejoj por vi, por ni ĉiuj; trovi adekvatan solvon por la redaktado de *Juna amiko*; starigi kaj/aŭ plibonigi kontaktojn kun ekstermovadaj establoj gravaj, kiuj agadas en la sama eduka kampo; kreskigi la motivadon de ĉiuj, ĉu estraranoj, ĉu sekciestroj, ĉu membroj, per klara kaj regula komunikado. Do vi povas kompreni, ke temas pri plua elano; mi ne intencas fari revolucion, mi volas iri laŭ la spuroj de Stefan, en mia maniero kompreneble.

Nova erao venas ĉe UEA, tion ni povis konstati en Rejkjaviko. Nia ligo al la estraro de UEA estos... Stefan MACGILL! Do ni plu paŝos manenmane. Kuraĝe antaŭen!

*Elkore salutas Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI*

Riĉiga kaj ĝojiga, bonetosa kaj frateca

Aŭdiĝis tiuj vortoj, kun multaj aliaj pozitivaj vortoj, kiam okazis bilanca parolado fine de la 46-a ILEI-Konferenco en Herzberg-Sieber en julio 2013.

La loko estis aparte agrabla en la vilaĝo Sieber, 7 km for de Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, en Germanio. Por la bezonataj veturadoj buseto de la fajrobrigado estis je dispono; tio estis unu el la helpoj, kiujn la urbo Herzberg donis al la organizantoj de la evento. Du hoteloj kaj konferencejo situas en mallonga distanco en belega naturo, tiel ke promenado de unu al la alia loko estis plezuro kaj okazo de babilado. Ekskursoj ebligis al la partoprenantoj malkovri la regionon, la urbon Göttingen kaj la urbon Hannover.

Aliĝis pli ol 100 personoj el 29 landoj. Bedaŭrinde 4 personoj el Afriko kaj 5 el Pakistano ne sukcesis akiri vizon al Eŭropo, do ili ne aperis. Tre feliĉiga punkto estis la partopreno de unu esperantistino el Makedonio. Ses el naŭ estraranoj partoprenis la Konferencon. Fine venis 87 konferencanoj el 23 landoj de 4 kontinentoj.

Dum la malfermo du urbestroj ĉeestis, tiu de Herzberg kaj tiu de Sieber. La unua (Gerhard WALTER) faris paroladon en Esperanto. Alia grava publika evento estis la inaŭguro de Ponto de Espero kun ŝildo en la germana, Esperanta kaj pola. Tiu tria lingvo endas pro la ĝemeliĝo inter Herzberg kaj Góra en Pollando. Kadre de tiu ĝemeliĝo okazis paralele al nia konferenco SALO, Somera Arbara Lernejo, kiu grupigas ĉiun jaron junulojn el la du ĝemelaj urboj. Tiu freŝa vento danke al partopreno de gejunuloj ĝojigis la konferencanojn. Diversaj aktivajtoj okazis komune.

La Komitato kunsidis valide kaj faris diversajn decidojn. Pri tio bv konsulti la retejon ilei.info. Unu el la decidoj estis la elekto de nova prezidanto: Mireille GROSJEAN el Svislando. Alia estis la elekto de du Honoraj Membroj: Stefan MACGILL kaj Katalin KOVÁTS. La Komitato aprobis rezolucion kaj aliĝon de nova sekcio en Sud-Afriko.

19 prelegoj diverstemaj okazis, same kiel grava diskuto pri instruista trejnado pro la ĉeesto de Katalin KOVÁTS, Ilona KOUTNY, Zsófia KÓRÓDY kaj Stefan MACGILL. Vidu pri tio la artikolon „Pinta konferenco”.

Metodika kurso gvidata de Katalin KOVÁTS arigis 20 personojn, el kiuj 15 ricevis atestilon. Dek personoj trapasis KER-ekzamenojn. Dum pluraj lecionoj Sabine TRENNER trejnadis grupon al mediaciado.

Vesperoj estis aparte viglaj kaj buntaj, kaj bongustaj dum la unua kunveno; tio estas kutimo en la ILEI-Konferencoj: ĉiu alportas iun manĝaĵon el sia regiono kaj ĉiu povas provgustumi el fremdaj pladoj.

En la fermo aparta danko iris al Stefan MACGILL pro lia elstara gvidado de la Ligo dum kvar jaroj. ILEI dankas la Organizan Komitaton kaj aparte ges-rojn Zsófia KÓRÓDY kaj Peter ZILVAR, kiuj enorme laboris por prepari tiun eventon, kiuj zorgis pri ĉio dume, kiuj gvidis, informis, cele al la komforto de la partoprenantoj.

Venontjare ILEI havos sian Konferencon en Montevideo, Urugvajo, antaŭ la UK. Eblos migri per ŝipo el Montevideo al Bonaero, Argentino.

Mireille GROSJEAN (Svislando)

Pri instruista trejnado: Pinta konferenco dum Tutmonda Konferenco

Ĉu vi konas la rusajn pupojn, kiuj kaŝiĝas unu en la alia? Oni nomas ilin kutime „babuŝka”. Dum la ILEI-Konferenco 2013 okazis pinta konferenco pri instruista trejnado. Tiu aktiveco estas unu el la plej gravaj celoj de ILEI kaj tia kunveno povis okazi danke al la partopreno de la ĉefaj agantoj en tiu tereno.

Partoprenis d-rino Ilona KOUTNY, respondeculino de la interlingvistikaj studoj en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań, Pollando. Tie pedagogio povas esti studobjekto dum la tria jaro de la interlingvistikaj studoj, aŭ unujara kurso. La trijara kurso okazas en la jaroj 2011-2014. Ĝi postulas ĉeeston dufoje jare en Poznań dum unu semajno. La studentoj, kiuj partoprenas tiun studprogramon, ricevas ŝtatan diplomon polan. La unujara kurso komenciĝos en septembro 2013 kaj postulas ĉeeston en Poznań en sep. 2013, feb. kaj sep. 2014. Ĝi ne donas ŝtatan diplomon, sed movadan.

Partoprenis d-rino Katalin KOVÁTS, redaktisto de *Edukado.net*, kiu lanĉis tie RITE, temas pri Reta Instruista Trejnado ĉe *edukado.net*. RITE estas privata programo de ŝi kaj pagenda lertigado. Iam iu povas komenci la programon kaj labori ie en la mondo per la reto. Oficiala prezento: „Reta Instruista Trejnado ĉe *Edukado.net* estas 100-leciona reta studeblo pri instruado kaj metodiko, kreita por instruistoj kaj instruontoj de Esperanto. La kurso havas modularan strukturon kun libera lerno-ritmo. La studoj estas malfermitaj al ĉiuj esperantistoj, kiuj plenumas la partoprenkondiĉojn kaj pagas la kursokotizon”.

Partoprenis Zsófia KÓRÓDY, vic-prezidanto de ILEI, kiu estas ĝia kontakt-persono ĉe ALTE: „*Association of Language Testers in Europe*”, eŭropa asocio de lingvaj testistoj. Ŝi jam partoprenis diversajn kunsidojn tie, kunverkis dokumentojn, prelegos tie en oktobro 2013.

Gvidis la kunsidon Stefan MACGILL, eks-prezidanto de ILEI. Ĉeestis kaj partoprenis Mireille GROSJEAN, prezidanto de ILEI, d-ro Ronald GLOSSOP kaj d-ro Duncan CHARTERS (iama prez. de ILEI) el Usono, Julián HERNÁNDEZ ANGULO el Kubo kaj Enikő ZENGŐ SEREGHY el Hungario, estrarano de ILEI.

La kunsido ne ebligis decidigajn paŝojn, sed vasta interŝanĝo de informoj kaj ideoj povis okazi. La diskuto havis kiel bazon la projekton MITE Modula Instruista Trejnado de E-instruistoj, verkitan de Stefan MACGILL. Lia ideo estas, ke la lernenda materialo por instruistoj estu dividita en pluraj moduloj studendaj dum iuj kongresoj, kursoj k.s. tiel ke la kandidato povu kolekti la atestilojn pri ĉiu modulo unuope kaj finfine atingi la celon: ricevi diplomon pri E-instruado. Partoj de tiu MITE povus esti foraj, aliaj ĉeestaj. La kunsidantoj konsideris tiun dokumenton, komparis ĝin kun la nun ekzistantaj strukturoj kaj konsciiĝis pri la neceso zorgi pri la ekzistantaj strukturoj unue.

Menciindas, ke ekzistas instruista trejnado en diversaj landoj sur movada nacia nivelo. Tiu temo estas centra por ILEI kaj la gvidantoj de ILEI klopodos starigi, subteni, evoluigi diversajn sistemojn kunlabore kun siaj partneroj. UAM kaj *edukado.net* estas du el la 14 partneroj de ILEI. Vi povas vidi la kompletan liston en la retejo www.ilei.info. Estas fakto, ke la bonaj kapabloj de niaj instruistoj estas ŝlosila aspekto de nia Movado.

Mireille GROSJEAN (Svislando)

La „Tago de la Lernejo” (TdL) traktis la temon „Edukado por justa komunikado”

Tiu TdL estas unu el la kernaj programeroj de la Ukoj, ĝi havis la ĉefan temon „Edukado por justa komunikado”, kiu alproksimiĝis al la temo de la UK kaj plie proponis tre variajn kontribuojn. Ĝin malfermis du novelektitaj prezidantoj, nome tiu de UEA Mark FETTES (Kanado) kaj tiu de ILEI Mireille GROSJEAN (Svislando). FETTES atentigis, ke la nova Estraro de UEA traktas kapabligon kiel kernan laboron.

Gravas kreado de pli kapablaj parolantoj de E-o, pli kapablaj konantoj de la E-literaturo kaj historio, pli kapablaj instruistoj. Tio estas nobla laboro kaj kompleksa multnivele, diris FETTES, aldonante, ke li vidas „kiom profunda estas la eduka kontribuo de la E-movado al la edukado de la mondo, al konscio vere konvena por la nuna epoko”. Li diris: „Mi antaŭvidas tre intensan kunlaboron kun la prezidantino kaj teamo de ILEI dum la venontaj jaroj”.

La prezidantino de ILEI Mireille GROSJEAN esprimis al FETTES dankon pro la parolado kaj ĝojon pri onta kunlaboro. Harmonia prezento aŭguras bonan daŭrigon de la kunlaboro!

La unuan kontribuon pri la loko de instruado kaj instruista trejnado en la strategio de UEA (ne nur, sed ankaŭ en la ĝenerala E-movado) prezentis Stefan MACGILL (Nov-Zelando/Hungario).

Al la temo de la TdL enkondukis per la prelego „Kio estas justa komunikado?” Mireille GROSJEAN (Svislando), kiu deiris de la demando „Kio estas komunikado?”, per ekzemploj pri (ne)justa komunikado.

Sekvis pliaj temligitaj kontribuoj. „Ĉu egalajn rajtojn kaj eblojn por ĉiuj je ekzameniĝo pri E-o?” Laŭ tiu titolo Katalin KOVÁTS (Nederlando/Hungario) prezentis la staton de la nova ekzamensistemo, kiu ĉiutage vekas pli kaj pli da intereso tra la tuta movado. „Per eŭropaj projektoj por justa komunikado” estis la temo de la kontribuo de Zsófia KÓRÓDY (Germanio/Hungario), kiu surbaze de la aktivado en la E-urbo Herzberg donis superrigardon pri diversaj ebloj utiligi E-on en la publika vivo. Kristin TYTGAT (Belgio) „venigis” la ĉeestintojn al la reala vivo. Dum la prelego

„Lingva situacio en bruselaj lernejoj” ŝi i.a. informis, ke ĉe la Libera Brusela Universitato ekzistas centro, kiu sekvas kaj analizas la lingvouzadon en Bruselo kaj jam trian fojon oni pridemandis bruselanojn pri la lingvouzo, lingvokono kaj identeco; tiuj enketoj donas informojn ankaŭ pri la lingva situacio en la lernejoj. Al la prelego aldoniĝis ankaŭ la kompara ekzemplo de Kanado. „Notetoj pri la ĉefa temo el la vidpunkto de la Nitobe-simpozio” estis titolo de la kontribuo de Otto PRYTZ (Norvegio).

La dua „bloko” estis direktita al instruado de E-o, aŭ pli klare ĝia praktika flanko. Pri „Strategia’ kaj praktika plano, por informi pri E-o en la lernejojn, laŭ la ĝisnunaj kaj estontaj eblecoj de la francaj edukaj programoj” prelegis Michel DECHY (Francio). Laŭ li, la reorganizo de la lernosistemo donos eblon al E-o pli facile eniri eduk-medion.

Praktikajn materialojn, mempretigitajn prezentis Anna LÖWENSTEIN (Italio). Kvankam la titolo de la prelego estis „Aldone al Stano MARČEK: instruado per projekciaĵoj” (ĉar ŝi lasttempe ĉefe instruas per la lernolibro de MARČEK), ŝiaj materialoj certe estos utiligeblaj ĝenerale ĉe la E-instruado. Ĝojigas la informo, ke ŝi pretas disponigi tiun materialon per la reto.

Spertojn el Afriko prezentis Paola BIRGIT GIOMMONI (Italio). La vigla prezento kun pluraj fotoj (re)vekis memorojn de kelkaj ĉeestantoj, kiuj same vizitis diversajn afrikajn landojn. Ĉi tiu okazo estis eblo instigi la partoprenantojn en la venonta Kvina Afrika Kongreso de E-o en Benino, kun aparta atentigo pri la eduka aspekto por infanoj el okcidentaj landoj „kiuj ĉion havas hejme”. „Tia partopreno estus ideala momento ekkoni Afrikon”. Krome oni atentigis pri la graveco viziti Afrikon, ĉar pro diversaj obstakloj (ĉefe vizoj) afrikaj e-istoj ne povas partopreni E-aranĝojn en Eŭropo.

„'Avantaĝo' de E-instruado: en la EU-parlamento jam antaŭ deko da jaroj” estis titolo de la kontribuo de Marija BELOŠEVIĆ (Kroatio). Ĝi ĉefe celis memori pri *Euroscola*, kiun dum la unuaj jaroj ĉeestis la kroataj lernantoj dank' al Esperanto. Nun, kiam Kroatio eniris EU-on, „rememoro” revenigis iujn iamajn lernantojn al la E-movado.

Peter ZILVAR (Germanio) per la prelego „Esperanto-urbo Herzberg am Harz – loko de multnacia, multkultura loĝantaro”, deziris substreki la gravecon de la ĉeesto de E-o en la ĉiutaga vivo. Bona ekzemplo estas ĝuste

la agado en tiu urbo. La lasta kontribuo titolita „Infektaj malsanoj en nia lingvouzo” de Rob MOERBEEK (Nederlando) vaste malfermis „okulojn kaj orelojn” el la vidpunkto de ĝenerala uzo de E-o. Li ŝerce diris, ke li fondis novan fakon „erarologio”, ĉar li „korektas revuojn kaj kolektas la erarojn, precipe, se ili estas komikaj kaj instruaj”.

La programo altiris centon da kongresanoj, inter kiuj pluraj aktive per propraj spertoj (aparte pri Afriko kaj lingvaj situacioj en la lernejoj) kontribuis al ĝi. La programon kompilis Marija BELOŠEVIĆ (Kroatio) kaj kungvidis ĝin Jennifer BISHOP (Aŭstralio).

La legantoj de IPR havos la eblon legi resumojn de tiuj prezentoj.

Marija BELOŠEVIĆ (Kroatio)

Raportetoj el la Tago de la Lernejo en UK 2013

Edukaj perspektivoj en la Strategia Vizio de UEA



La dekjara vizio kaj la trijara Strategia Plano (2013-2017) restarigas edukadon centre de la prioritatoj por UEA – sub la ŝildo ‘Kapabligo’. Tiu planparto detalas precizajn kaj mezureblajn celojn kiujn UEA atingu kunlabore kun ŝlosilaj ludantoj – ILEI, *lernu.net*, *edukado.net* kaj pri la instruista trejnado – interalie ĉe la oficialaj kursoj de UAM en Pollando. Iam en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj edukado ricevis fortan atenton ene de UEA: nun estas tempo restarigi tion – efika instruado de la lingvo estas afero por la tuta movado (organize, finance); la rolo de ILEI estas alporti

la bezonatajn fakajn kapablojn. Alia aspekto de ‘Kapabligo’ estas aktivula trejnado kaj ĝenerala klerigo de la komunumanoj.

Fine, estis prezentita nova labormodelo por la estraro, kun tri subteamoj: la unua pri administrado (la Mastruma teamo), la dua pri kontaktado kun neesperantistoj (la Monda teamo) kaj la tria, kiu koncernas pleje la ligan – (la Movada teamo). Ĝia esenca rolo – sub mia gvido - estas fortiĝi la rilatojn kun Landaj kaj Fakaj Asocioj, E-Centroj, Landaj Sekcioj de ILEI kaj TEJO, kaj aliaj, por intensigi la atingojn pri Konsciigo (informado), Kapabligo (edukado) kaj Komunumo (utiligo) lande kaj regione. Obŝtakloj abundas, sed ekŝcitaj tagoj kaj jaroj antaŭas nin!

Stefan MACGILL (Nov-Zelando/Hungario)

Prezentado de Esperanto en diversaj francaj lernejoj

En elementaj lernejoj [5 jaroj]:

Prezentado de la lingvo E-o al la klasoj CM 2 (la plej aĝaj lernantoj, +/- 10-jaraĝaj).

1-a leciono: La lasta litero de vorto: substantivo, verbo, adjektivo, adverbo kaj la konjugo.

Kelkaj afiksoj: mal-, -ec, -ul, -in; kun la radikoj: JUN, RIĈ, BEL, BLIND.

„Ludi” kun kelkaj adjektivoj (facile en Eo, malfacile en la franca). Demandoj kaj respondoj.


2-a leciono: Matematiko en E-o: kalkuli, nombri; legi kaj traduki simplajn matematikajn frazojn; kolorigi geometriajn figurojn (bazaj koloroj kaj bazaj figuroj).

3-a leciono: La kalendaro: la suno, la tero, la luno; la monatoj de la jaro, la tagoj de la semajno. Geografio: mapo de Eŭropo, ĉefpunktoj, landoj kaj ilia ĉefurbo, maroj, oficialaj lingvoj parolataj en kelkaj landoj...

4-a leciono: Du kanzonoj. Se estus la kristnaska periodo, kial ne „Paca Nokto”, kaj „La Eta Tamburisto”.

Du poeziaĵoj: „Pentri la Pacon” kaj „Letero de Nigrulo al Blankulo”.

Aŭ prezentado kaj uzo de sorobano, la japana kalkulilo, kiun majstre prezentis Kimie Makarian en diversaj medioj pere de diversaj lokaj gastigantoj kaj tradukantoj. Mi plurfoje akompanis ŝin kaj poste aĉetis la



materialon el japana firmao (t.e. iu granda por klarigi al la tuta klaso kaj „etaĵ” por ke ĉiu lernanto povu sperti nombradon kaj facilajn kalkulojn).

En mezgradaj lernejoj [4jaraj]:

Kulturaj semajnoj organizataj de la lernejoj mem: mi prezentas la lingvon E-o al ĉiuj samnivelaj klasoj (plej ofte la plej junaj: +/- 12-jaraĝaj); [tiel kiam mi revenos ne estos iuj, kiuj jam partoprenis, dum aliaj malkovras ion tute novan].

„Klubo E-o”: mi perlaboris mian vivon instruante matematikon en tiaj lernejoj kaj en Francio oni rajtas instrui E-on al la volontuloj dum tiuj „kluboj”. La gelernantoj povas elekti diversajn proponitajn temojn kulturajn aŭ sportajn. Tiuj kluboj okazas dum la paŭzoj aŭ fine de la diversaj lernotagoj. Kompreneble la adoleskantoj devas esti ege kuraĝaj por labori dum iliaj samklasanoj libertempas... En 2001, miaj lernantoj estis akceptitaj en la Eŭropa Parlamento en Strasburgo, la 9an de majo, okaze de la programo „Euroskola”.

En liceoj [3jaraj]:

Fine de la lernojaro, oni trapasas la faman abiturientan ekzamenon kaj poste oni rajtas eniri universitaton. Invitoj de instruistoj pri Geografio (temo: Tutmondiĝo) aŭ pri filozofio (temo: komunikado).

En APMEP:

Tiu Asocio de Profesoroj (aŭ Instruistoj) pri Matematiko de la Publika Instruado (ne por tiuj, kiuj instruas en privataj lernejoj), organizas ĉiujare konferencon en iu franca urbo dum la unua feria periodo fine de oktobro, komence de novembro. Pluraj centoj da partoprenantoj, multe da prelegoj kaj diversaj „atelieroj”. Mi proponis en Lille, Besançon kaj Clermont Ferrand atelierojn kies temo rilatas al E-o: „Matematiko kaj E-o, kiom da komunaj trajtoj!”

Konkludo:

Ĉiam mi estis bone akceptita de la gelernantoj kaj de la instruantoj, ĉu en mia urbo, mia regiono, eksterregione aŭ eksterlande. Dufoje regiona televidkanalo raportis pri tio.

Michel DECHY (michel_dechy@hotmail.com, Francio)

Instruado de matematiko

Kial gravas la amuzaj taskoj en matematiko?

Mi kredas, ke la plejmulto de miaj kolegoj pri matematiko komprenas la magiecon de la amuzaj taskoj dum la leciono pri matematiko. Kial do?

Unue, ĉar matematiko kiel lernobjekto estas relative malfacila pro sia abstrakteco, rigoreco kaj formuloj, dum la amuzaj laboroj ne postulas multe da teoriaj scioj. Pro tio la franca matematikisto Blaise Pascal sugestis, ke ni uzu ankaŭ ilin dum la lecionoj.

Jen simpla tasko: Botelo kun lakto kostas 1 eŭron. Lakto mem kostas 90 cendojn pli ol la malplena botelo. Kiom kostas la malplena botelo?

Plimulto de gelernantoj hastas respondi: 10 cendoj, kio ne veras. Tion oni tuj povos prui uzante ekvacion.

Alia tasko: Unu paŝtisto diras al la alia: se vi donas unu ŝafon al mi, la nombroj de la ŝafoj ĉe ni egaligos. Se vi donus al mi unu ŝafon, rediras la alia paŝtisto, tiam mi ekhavas la duoblon de viaj ŝafoj. Kiom da ŝafoj havas ĉiu paŝtisto?

Kompreneble nepras uzi sistemon de ekvacioj!

Cetere la amuzaj taskoj devas rilati al ĉiutagaĵoj, kiuj vekas ĝeneralan intereson. Ekzemple: Kiamaniere oni disdividu 7 panojn tutegale por 8 personoj je malplej granda nombro da tranĉoj?

Povas esti, ke la amuzaj taskoj prezentiĝas kiel historiaĵoj; ili estas ege ŝatataj. Ekzemple: Tri araboj vojaĝis en dezerto. Unu kunportis 5 flanojn, la dua 3 flanojn kaj la tria 8 monerojn, kiujn li donis al la unuaj du. Ili manĝis ĉion kune. Kiamaniere oni devas dividi la 8 monerojn? La gelernantoj kutime diras la versiojn 5-3 aŭ 4-4 kaj ne povas imagi ke la ĝusta versio estas 7-1!

Unu viro en antikva Romo estis mortonto dum lia edzino estis graveda. Li testamentis, ke se naskiĝos knabo, li ricevu duoblon de la riĉaĵo kompare al sia patrino; se naskiĝos knabino, la patrino ricevu duoblon de la riĉaĵo kompare al la knabino. Sed la edzino naskis du ĝemelojn, knabon kaj knabinon. Kiamaniere oni devas dividi ĉikaze la riĉaĵon?

La amuzaj kaj enigmaj laboraĵoj helpas notinde por parkerigi kaj plifirmigi la formulojn kaj teoriojn de matematiko. Tiucele utilis tasketoj uzantaj la konatajn identaĵojn pri la kvadrato aŭ kubo de binomoj,— $(a+b)^2$, $(a+b)^3$, diferencon de la du kvadratoj a^2-b^2 ktp.

Solvante amuzajn taskojn, oni aplikas la principojn de logiko, tiel necesajn por matematiko.

Ne laste, la amuzaj tasketoj povas servi iufoje kiel ĝermigado de tute novaj teorioj en matematiko.

Mi kolektis la plejparton el ili kaj eldonis du librojn por aĝogrupoj 10-15-jaraj kaj 16-19-jaraj. Ekzistas jam ankaŭ Esperanto-versio.

Mi daŭre kolektas kaj sistemigas novajn amuzajn taskojn kaj bonvenigas dankeme kiun ajn kolegon, kiu sendos al mi eĉ unu novan eron.

Bardhyl Adem SELIMI (bselimi@gmail.com, Albanio)

Erarologio aŭ infektaj malsanoj en nia lingvouzo (I.)

Erarologia averto: Jen iom arogaj titoloj por prezentoj en la ILEI-konferenco kaj la UK-Tago de la Lernejo. Sokrato instruis, t.e. komprenigis, ke li, sugeste ĉiu, scias nenion (krom unu morala leĝo). Tamen la respekto al la tutmonda lernebleco de Esperanto emigas serĉi kaj subteni iugradan unuformecon en la lingvouzo. Kiel korektanto mi kolektadas la tro originalajn lingvaĵojn de nia plenviva komunumo. Eble ekestos ia didaktika vortaro. Provizore mi povas nur rekomendi kritike esplori miajn notojn. Kompreneble mi estos danka pro viaj korektoj (mi skribis 'korketoj', sed tion {la} PIVo ne permesas tiusence).

Vi trovos du partojn en sinsekvaj numeroj de IPR. La disdonitaj 17 misfrazoj sekvos, kun miaj 'solvoj'.

ENKONDUKO:

Ĉu ĝi estas la arto fari erarojn? Tiusence ĉiuj kompetentus. Sed reale ĝi rolu kiel helpa scienceto por la granda pedagogio.

Se ĝi havas sencon: ĉar eblas rigardi la lingvan evoluon kiel moviĝantan amebon, kiu elpuŝas ŝajnpiedetojn, kiujn ĝi retiras en malfavora ĉirkaŭaĵo, sed pluetendas en favora tereno, mem kuntrenate.

Lingve nin tedas „eluzitaj” esprimoj, ni bezonas varion, novigon, kreadon. Kion aprobi, kion malagnoski?

Teksto estu minimume komprenebla kaj iujn kriteriojn heredigis la tradicio: Nia 'amebo' ja ne splitiĝu (disdialektiĝu), kerne ankrita sur netuŝebla fundamento. El la iniciatoro Zamenhof kaj <aliaj!> bonaj aŭtoroj ĉerpis Plenaj Vortaro (1930) kaj Gramatiko (1935), kies evoluigo rezultigis la imponajn 'nedigesteblajn' PIV (1970..., 2002, 2005) kaj PAG (4a eld. 1980). kun plifaciligaj Pomego kaj Detala Gramatiko de Bertil WENNERGREN. Sed ekzistas ankaŭ stillibroj neneglektindaj, interalie „Ne Tiel sed Tiel Ĉi” (F. Faulhaber, 1965).

Fakte ni bezonas por ĉiu nacia lingvo 'didaktikan vortaron', kiel jam ekzistas por la japana. Ĉar – krom en-Esperantaj konfuzoj pro paronimoj, foje malfacila elekto inter sinonimoj laŭ la kunteksto – nin plej kuntrenas nacilingvaj rutinoj, ne nur el la propra sed ankaŭ el la rega lingvo (ofte la angla).

'En fremda okulo ni vidas ligneron, en propra ni trabon ne vidas.'

Nia reago al aliaj povas varii inter indulgo kaj indigno. Sed foje dolorigas propra eraro. Eta falsa amiko povas eĉ divorciĝi: „Min tro premis la tento, do mi tranoktis ĉe afabla gastigantino” povus diri naiva nederlandano, simple celanta „tendon” (tent).

Laŭ la grado ni povas recenzi per „interesa novigo, kvankam ne imitinda”, lingva miso, fuŝo, ... fia idismo”. Marjorie Boulton pledas juste sed milde trakti niajn aŭtorojn, senprofite sinofere riĉigantajn nian literaturon. Kaj ekz. Lidja Zamenhof verkis en tempo sen PV, sen PG aŭ almenaŭ antaŭ ol ili povis influi la lingvadon. Nia sentesprimo pri eraro emas dependi ne nur de la lernofazo, sed ankaŭ de nia klaskonscio, sociaj rilatoj, la rango, aŭtoritato de la 'pekinto' (pozitive aŭ negative). Sed gravas krome la intenco: formala aŭ banala. Certe por oficialaj tekstoj, UEA-eldonaĵoj kaj ekzaminaĵoj necesas sufiĉe alta nivelo.

Komencantojn ni kuraĝigu, akcentante iliajn bonajn esprimojn, progresantojn ni povas - foje ne tuj - konsciigi, dignulojn ni respektu sed en

oportuna momento demandu ĉu ili akceptas atentigon pri la lingvouzo. Mia sperto estas ke la plimulto ja aprezas korektojn. Je propra stilo ja ĉiu rajtas, stile ekzistas poetaj licencoj, 'katakrezo' ('la kaĉo startis jene') kaj enalago (La homo uzu la kapon, aŭ ili prenu kafon.)

Stilaj eraroj ofte malpli ŝokas ol fonologiaj (parolsonaj), ortografiaj, gramatikaj aŭ leksikaj (vortprovizaj). Tamen de bona stilo dependas nia aprezo de tuta libro. Mia celo estis trakti la plej oftajn erarojn, tamen science tio postulus statistikan analizon, kiel faris prof. Wim Jansen surbaze de nederlandaj E-ekzamenoj. Mi povas prezenti nur la fruktojn de iom longa korektada laboro: 'plagiato' do, kvankam mi mem kontribuis al la maro da eraroj. Trudiĝas la ideo, ke la ofteco de lingva elemento influas la oftecon de ĝia misuzo. Ne ĉiam, sed evidente pintaj elementoj ofte bezonas erarologian komenton.

Laŭkategorie ni traktos Fonologion, la artikolon, la verbon 'esti' kaj listeton da pliaj elementoj.

FONOLOGIO/ORTOGRAFIO:

Orient-azianoj kiuj nejunaj lernis E-on, ofte malfacile distingas L/R: 'arta' junulino ne originas el reakcia tubo, sed estas modernkreska. Ankaŭ aliaj malfacile diferencigas Ĝ/Ĵ: rezultas mikso de 'ĵus' kaj 'ĝuste'. Pro nacia influo s/z, k/g kaj f/v misakribigas *positiva, *filosofo, *egzameno. Helpas, se ni tre atente elparol(ig)as. Same ĉe vokaloj: 'apartamento', sed 'departemento'. 'Ĵaŭdo' kaj 'ĵurnalo' bezonas supersignon, 'ĉirkaŭaĵo' eĉ tri. Majuskle Esperanto, Esperanta, Esperante kaj Esperantujo/io, sed minuskle 'esperantisto'. Gravas eviti anglismojn kiel Esperanto Kongreso: nepras liga streketo aŭ unuvorta kunskribado, kaj sensenca estas 'inter alie' anst. 'interalie'.

AKCENTO

Plej mirigas la finakcento en *apúd, kvazaŭ temus pri eliziita vorto apud' el *apudo". Nur veraj komencantoj akcentas ĉirKAŬ: do bv. ripetigadi „ápuđ la tablo", kiel „ĉírkaŭ la tablo": la fascina -d ne pravigas misakcenton.

ARTIKOLO

„La" estas instruebla laŭ la himno (publikigita en 1893), ne por eviti la vortojn per lalala-ado:

Kial „LA Espero” havas la artikolon? Nu, ĝi simbolas la internan ideon, esprimitan jam en „Mia Penso” (praesperante „Ma pinto”) el 1887: „amikino ...kantas kanton pri l' espero”. Do jam konata.

*”En mondon venis la nova sento” implicus, ke ni kontaktas plurajn mondojn kaj ke nun temas pri iu ajn el tiuj; krome 'la sento' jam estus enhave konata. Male, la poemo iom post iom solvas la scivoligan neklarecon per 'sankta harmonio', 'rondo familia'; Nur ĉe 'flugiloj' de facila vento eblus aldoni „la”, sed tio ja simbolas la blovojn de favora vento; simile paralel-strofe "laboro" de la esperantoj povus havi la artikolon, sed evidente Zamenhof konsciis ke la homoj havas apartajn talentojn, ĉiu siafake kontribuu al la movado. Kiel ajn ni klarigas, la argumentado orientos senartikolulojn en la uzado. Kaj por LA-lingvuloj utilas studi la deviojn disde la nacilingva artikolado (riveroj, maroj, montoj; titoloj....)

ESTI, la plej ofta verbo. Do variigenda per 'situi', 'ekzisti', 'troviĝi', 'restadi', 'loĝi', 'vivi' ktp ktp....

Se vi aŭdas „Estas varma”, vi certe atendas ian kompletigon: la akvo por infuzi teon; kaj „Tio estas bone” divenigas '... farita, dirita, elpensita'.

Sed homoj protestas: La subjekto de „estas bone” ja estas esprimita (muziki). Kial do la -e? Eblas argumenti, ke laŭ nederlanda filozofo 'esto estas ŝajno': fakte ĉio oscilas, eĉ se ŝajne stabila. Do 'estas' signifas 'statas' aŭ eĉ 'okazas': tial ni klarigas ankaŭ la absolutan tenson en „Estis bone ke vi helpis (ne -as)” (= okazis bone: 'taksa opinio' laŭ PAG)

Kaj nepras sci(ig)i ke 'ekesti' kaj 'estiĝi' ne rolas kiel kopulo, sed estas memstaraj laŭsignife: „Li estiĝis oratoro” imagigas bebon superŝutantan la gepatrojn per lapenneca elokventado.

AKUZATIVO: Unugeste la tri funkcioj: Iru tien, cent metrojn, okupu la monteton.

Post kaj, kiel kaj ol: Mi salutis la najbarinon kun la hundo kaj la edzo. Li estis elektita kiel prezidanton; Mi vidis birdon pli grandan ol katon; ni aĉetis multon kiel kajerojn, krajonojn kaj kretojn.

Ni evitu duoblajn neon kaj rektobjektan akuzativon ('lernigi iun Latinon' signifas iun formon de Latino, ne „al iu Latinon”); Iuj devas simple lerni, ke frazkomenca „Mankas” atendis la subjekton, por frazkerno pli bezonatan ol objekto; same post „Okazis...”, „Aperis...”

Ofte oni forgesas ke apozicio samkiel postmetata epiteto bezonas akordon kun la substantivo: tiel distingiĝas „Mi trovis la horloĝon perdita/perditan”. (la nominativo spegulas la lamenton „perdita!”). Kaj ni lernu, ke post 'adiaŭi', 'kompati' sekvas rekta objekto. Tio nacilingve malfaciligas tradukon de la pasivaj „kompatata, adiaŭata”...

PLURALO: Mi ĵus devis korekti 'diferenco inter la nacia kaj internacia lingvo(!), kvazaŭ 'inter' tolerus singularon.

Ferisezone svarmas la unutagaj libertempoj: dum mia ferio konstante pluvadis. Se ni miskomencas eblas elturniĝi per '(mia) feri...ado' aŭ 'feri...aro'. Kompreneble estas pli bone simple lerni 'miaj ferioj'. Aliflanke 'statuto' ŝajnas fremda al multaj samideanoj. Faru ŝatokupon el la kolektado de ĉi tiaj diferencoj disde la nacia lingvo.

VERBO: Mem korektu: poste ni povas televidi; ŝajnis ke li dormis; kiam (!) mi estis riĉa, mi povis vojaĝi kiel vi; ĉu ni iros? ne haltu ĝis atingi la lernejon; antaŭ agi, pripensu; per labori vi sukcesos; situata, indignita; la ĉeestintoj bone amuzis; lernanta sako multe pezas; la turo estas konstruita en 1600; la pordo estis fermata. Li kondukis sin strange; ni ekzercu tiun kanton; kiu falsigas pasportojn? La vetero ŝanĝas; ni daŭrigu studi; ni ĉesu la debaton. La malfruo de la trajno rezultis en prokrasto de la kunveno. Kiu ebligis vin fumi?

PRONOMOJ: la bestoj kaj ĝiaj idoj; en lia unua regotago la reĝo jam pumfalis; kiu konas la prezidanton kaj ties edzinon? En tiu (aŭ la nuna) libro vi trovos miajn rememorojn. Lastsabate mi aŭdis ion en la ĝardeno de la najbaro, kiu tre mirigis min.

PREPOZICIOJ: kun kiu trajno vi venos? en la tablo kuŝas libro; ni iru tra la ponto; laŭlonge la vojo; kiom vi enspezas pomonate? speco da pomoj, duono da porcio; je la 30a ni revidiĝos.

SUBJUNKCIOJ: pli malpli granda ol vi; depost mi konas ŝin, ŝi ĉiam salutas; malgraŭ vi malsatas, unue laboru!

AFIKSOJ: ĉu vi ne datumis la mesaĝon? Oni senŝarĝis la kasiston; detaligo de la programo. translokigo de piano; tie estas tabakejo.

Ili festas sian kvindekjaran geedziĝon.

Pseŭdosufiksoj: la maljunulo komencas dementi.

DEMANDOJ: ĉu vi ne datumis la mesaĝon? Ne.

PARONIMOJ: La polico serĉas la inicianton... Oni trovis dekmetran fosilon

FALSAJ AMIKOJ: li perdis la memkontrolon

NACIA INFLUO Le bela herbejo plenas je sterko

EVITENDA (PIV): tion asertas ĉiuj ekspertoj

ARKAISMO (PIV): ĥino

VORTORDO En tiu tago vidis ni multon, en kiu ni jam planis hejmeniri.

STILVARIO Eble eblas ke ni eraras. Okazis multaj okazintaĵoj okaze de la UN-tago de Paco.

Sed pleje mi ŝatas la KOMIKAJN ERAROJN. István ERTL kolektas ilin en „La Ondo de Esperanto”. El korektolaboro: (Post longa kunsido) en varmega sabata posttagmezo ĉiuj sopiris finan fipozon.

Solvoj

VERBO: poste ni povOS televidi; ŝajnis ke li dormAS (se li ne vekigis, kion implicas „dormis”); SE mi estUS riĉa, mi povUS...; ĉu ni irU? (demando por konsento, ne pri la jam fiksita programo); ne haltu, ĝis VI ATINGOS ('ĝisatingi' ja estas uzebla verbo; miakomprene, nur tiuj prepozicioj antaŭu infinitivon, kiuj ne funkcias kiel prefikso: tial ni diras 'proparoli' anstataŭ *porparoli {oni aŭdus: 'por paroli'}, neniuj problemoj ĉe 'anstataŭ' kaj 'sen' {se uzata gramatike} , nur el 'kromsalajro' ni povus formi la verbon 'kromsalajri'); antaŭ ol agi (misaŭdeblas antaŭagi= prepare agi; Zamenhofa proverbo: 'Antaŭe intencu kaj poste komencu'); laborante - aŭ per laborado - vi sukcesos (ne: vi sukcesos perlabori); pasiva participo ĉe netransitivaj ne eblas, do: situANTa kaj indign(ANT)a; ne post la ĉeesto, sed dume la ĉeestANToj SIN amuzis (aŭ amuzIĜis); sako DE LERNANTO, aŭ simple lernosako, lerneja sako; la jardato fokusigas la atenton al la pasinteco, do ne estas, sed estIS konstruita; la pordo estis fermITa (se ne kutime fermata je certa horo aŭ koincide kiam iu interŝovis la ŝuon: tiuokaze oni estis fermanta la pordon), sed ni evitas la problemon per AKTIVIGO: iu/oni/ni fermis la pordon; esprimmikso/idiotismo=naciismo: li sin tenis= li kondukis; ni ekzercis NIN PRI tiu kanto (same ĉe

'trejni'); kiu falsAS pasportojn? (Latino havas 'supinon' (infinitivsencan substantivon), sur kiu baziĝas kaj la pasiva participo kaj intensiva/ada verbo: pro tio apert- donas konflikton: ĉu adjektiva (PIV), aŭ transitiva (Camacho); eblas parkerigi la serion abstrakta-abstrakti, egala-egali, falsa-falsi, fiksa-fiksi...); 'ŝanĝi' estas nekompleta nocio: ĝi postulas rektan objekton: la vetero ŝanĝas nian humoron, sed oni celas: ŝanĝIGas; Zamenhof respondis lingvan demandon pri 'daŭrigi': li ne celis uzi ĝin kun infinitivo. Do: ni daŭrigu = kontinuu la studadon/ ni plu studadu, ne ĉesu studi; 'ĉesi' mem estas netransitiva, male al 'fini' (komparu 'eki' kontraŭ 'komenci'): ni ĉesIGu la debaton = ni ĉesu debati; iom bizare impresas 'en', t.e. pro prokrasto de la kunveno rezultis, t.e. sekvis malfruiĝo de la trajno. Oni volas diri: EL malfruiĝo rezultis prokrasto, la malfruiĝo rezultIGis prokraston (fakte tiu 'epidemio' jam preskaŭ pasis, necesas nur sporade postkuraci); persono ne 'eblas': tiu 'infekta malsano' ja bezonas nian atenton: kiu ebligis = permesis AL VI= donis al vi la eblon - ne 'eblecon' - fumi?

La bestoj kaj ILIAJ idoj; en SIA unua regotago; plia infektaĵo: la prezidanto kaj LIA edzino (sen emfazo, nenie aperas la bezono diferencigi; iuj uzas TIES eĉ anstataŭ SIA); en ĈI tiu libro...(francismo kaj anglismo, respektive), io... kiO (nur se sekvas adjektivo necesas 'kiu': IO nova = nova aĵo, KIU); PER kiu trajno (se ne ludilo kunportata); SUR la tablo (hispanismo); TRANS la pontoN; LAŬ(longe DE) la vojo; PO kiom vi enspezas? (PO antaŭu la interesan novan kvantan informon, ne la mezurunuon); SPECO implicas ne kvanton, sed kvaliton, do sekvas DE; preciza PARTO implicas difinitan tuton, do ne kiel 'glaso da akvo', sed duono DE porcio; la 30-AN (tagon; JE eblas nur ĉe horo aŭ festotago); pli-malpli (kun streketo) (tiel) granda KIEL vi ('ol' tolereblas nur ĉe neegala komparo; 'pli malpli' signifas pli altan gradon de malkresko); 'de post' enkondukas prepozitivon, ne subpropozicion, ĉar la kerno estas la prepozicio 'post': de(post) KIAM mi konas ŝin/(de)post KIAM mi ekkonis ŝin; ankaŭ 'malgraŭ' rolas nur kiel prepozicio: oni celas malgraŭ KE = KVANKAM.

'Datumi' surprize estas netransitiva (ĉu pro la internacia vorto 'datum'?): ĉu vi ne DATIS...? prefiksa SEN adjektivigas radikon: senŝarĝa. Do oni senŝarĝigis = malŝarĝis la kasiston; DETALIGO signifas, ke la programo fariĝis ero de pli granda tuto: ekz. la tuta aranĝo de kongreso, kun reklamado, serĉado de financoj, laborfortoj... detalADO estas plene

pravigebla pro la tempinvesto en la programo. alie necesus detalmeto (Zamenhof destinis 'meti' kiel universalajon, samkiel JE kaj -UM) aŭ ĝisdetaligo; translokADo, se oni ne igis aliajn transloki la instrumenton; tabakEJo suferas la signifoamplekson de niaj sufiksoj: necesas precizigo: tabakVENDejo/produktejo/kultivejo.

Ĉe kvindekjara geedziĝo oni komentus: „Iom longa provo fariĝi deca paro”; geedzECo evitigas tian mokadon; dementi = nei (malkonfirmi, PIV), oni celas 'demenCI', perdi mensajn kapablojn;

Post nea demando ni ripetu la predikaton, ĉar diversaj kulturoj malsame interpretas la respondojn 'jes' kaj 'ne': 'Ne, mi kontrolis' aŭ: Ne, mi ne kontrolis' (tion mi (ne) faris; sama neceso ĉe jesa respondo).

Ofta esprimmikso: la iniciatinton/iniciton.

Fosilion; sinregon; nur francoj misskribas 'Le' anst. LA kiam sekvas silaboj kun E; ĉiuj fakuloj (PIV evidente ne ŝatas homonimojn: ek-sperto); ĉino. Multon ni vidis en tiu tago, en kiu... (utilas proksimigi la rilativon al ĝia korelativo/reprezentato). Povas okazi ke ni (eble) eraris; multo okazis honore al/ oni multon aranĝis okaze de...

Kaj post ĉi tiu superrigardo, al kiu eblas aldoni interpunkcion ('Ne dankon', anstataŭ 'Ne, dankon!') kaj vortordon ('Mi ne ankoraŭ = jam ne = ne plu laboras', sed oni celas 'ankoraŭ ne' = ne jam...) ni traktu la disdonitajn frazojn.

(daŭrigota)

Rob MOERBEEK (Nederlando)

Reformo de la eduksistemo en Rusio

Enkonduko

De dudek jaroj, de post la forfalo de Sovetunio, Rusio provas modernigi, kopiante okcidentaĵojn. Sekve multaj reformoj, proponoj, leĝoj aperas. Jen alvenis leĝo pri reformo de la ŝtata eduksistemo, kiu komenciĝis en 2010. La propono estis malakceptita pro nepreciza enhavo kaj ... ortografiaj eraroj! Nun estas decidita la 7a versio. Kiam la Parlamento (Duma) ekzamenis ĝin, malaperis el la teksto proponoj, akceptitaj de la Ministerio pri Financoj, i.a tiuj, kiuj garantios salajron al la instruistoj ligitan al la

averaĝa salajro de la regiono, decajn stipendiojn kaj loĝeblojn al studentoj kaj kroman monon al la kamparaj instruistoj. Forte reagis la profesiuloj, kaj nun tiuj proponoj reaperis en la fina leĝo.

Sed daŭras la kritikoj: Oleg Smolin, vic-prezidanto de la edukkomisiono ĉe la Parlamento, kritikas la 150 alineojn, kiuj distribuas la decidpovojn inter la ŝtatoficistoj. Kiu decidos? la urbestro? la regionestro? la registaro? la Ministerio pri Edukado?

Iuj, ekzemple estro de edukcentro en Moskvo, atentigas, ke leĝo fiksas nur la ĝeneralan kadron kaj tiu leĝo permesas enkonduki novajn aĵojn, starigas veran leĝan kuntekston kaj certigas egalan alireblon al edukado por ĉiuj.

Ne solvita restas la divido de la roloj inter la ŝtato kaj eklezio, kia ĝi estas priskribita en la Konstitucio: la nova leĝo rajtigas la diversajn religiojn partopreni en la prilaborado de la programoj kun deviga kurso pri „Enkonduko al religio kaj etikaj reguloj”. Ĝis kia grado intervenos la diversaj religiaj grupoj?

Infanĝardeno

La reformo de la sistemo por etuloj (de 3- ĝis 7-jaruloj) estas tre pozitiva. Ĝi antaŭvidas apartan ciklon (tio ĝenerala estas internaciskale), sed apartigitaj estas prizorgado kaj instruado. La ŝtato zorgos (= pagos) nur por instruado. Kiu pagos la prizorgadon? (la urbo? la gepatroj? sponsoroj?)

Unuagrada lernejo (elementa)

Oficialiĝas hejma kaj perkoresponda instruadoj, vere necesaj pro la geografia izoliteco de multaj infanoj. Handikapitaj infanoj ricevas la rajton viziti normalan lernejon .

Sed pli nova estas la kriterio pri „respondeco de malbonaj lernantoj ... kaj malbonaj instruistoj”! La leĝo antaŭvidas forĵeti instruistojn, kiuj ne bone plenumas sian rolon. Sed kiuj estos la kriterioj? (Napoleono jam diris, ke ne ekzistas malbonaj soldatoj, estas nur malbonaj oficiroj ...)

Tiu reformo ebligas al lernejoj organizi kursojn pri fakoj ne devigaj en la oficiala programo (ĉu ŝanco por Esperanto?) La programo estas sufiĉe vasta por certigi, ke dum ankoraŭ longa tempo, unuagrada instruado restos senpaga. Fakte granda ŝanĝo aperas en la financado de la lernejoj. Antaŭ

kelkaj jaroj la registaro financis la lernejojn surbaze de la nombro da lernantoj. Sekve multaj kamparaj lernejoj devis fermiĝi. Ekde nun aliaj normoj fiksas minimuman funkciadon pagitan de la ŝtato kaj de la lokaj komunumoj.

Duagrada lernejo (meza lernejo)

Neniu ŝanĝo, krom malapero de ekzameno por eniri

Triagrada lernejo (liceo, gimnazio)

De deko da jaroj funkcias neoficiale „eŭropa sistemo”: 4 jaroj por prepari abiturientan ekzamenon, kaj du jaroj por „magistriĝi”. Tamen kelkaj institutoj konservis la sovetan sistemon: 5-jara universitata fakuliĝo post la abituriento. Nova ciklo aperas kaj titoliĝas „Preparo de kadruloj kun supera kvalifiko” por universitataj asistantoj, estontaj kuracistoj, doktoriĝantoj aŭ esploristoj.

En lando, kie geografie estas malfacile proponi la samajn edukeblojn al ĉiuj, en lando kun grandegaj problemoj sociaj kaj ekonomiaj (Moskvo kun 10% de la loĝantaro mastrumas minimume 60% de la ekonomio), estas malfacile trovi sistemon por ebligi al ĉiuj infanoj aliron al kvalita instruado kaj garantii al la instruistoj decan vivnivelon. Ĉu tiu reformo helpos?

Renée TRIOLLE, <triolle.renee@wanadoo.fr, Francio>

Universitato de E-o, Oriento kaj Okcidento

Por tiuj kiuj interesiĝas pri la Projekto Universitato de Esperanto, nun videblas la kompletaj kursoj de profesoroj Ron Glossop kaj Federico Gobbo ĉe *www.universitato.info*. Tiuj kursoj estiĝis dank' al la volontula laboro de ili, kaj dank' al la filmada kaj prilaborada laboroj de Paŭlo Kozsuch el Hungario, Derek Roff el Usono kaj Miaohui el Ĉinujo. La kursoj, kvankam faritaj speciale por la projekto Universitato de Esperanto, tamen estas veraj kursoj originale instruataj kiel normalaj lecionaroj ĉe universitatoj en Italio, en Usono kaj en Israelo en la lingvoj itala, angla kaj hebrea, mi supozas.

Nun, komenciĝas metiĝi sur la Interreto la kurso de profesoro Amri Wandel *Enkonduko al astronomio kaj astrofiziko*. La budhano Miaohui el Ĉinujo, kiu volontule filmis la tutan kurson de Amri en Pekino lastjare, nun prilaboras la lecionojn en sia monaĥejo proksime de la fama urbo Xian en Ĉinujo (Miaohui en si mem estas tre interesa ekzemplo de nekutima e-isto! Vi povas eĉ resti ĉe lia monaĥejo en Ĉinio kaj studi budhismon tute en E-o!). Ĝis nun Sinjoro Miaohui enretigis 6 el la 20 lecionoj de Profesoro Wandel (unu leciono estas pli-malpli la ekvivalento de duhora universitata kurso).

La kursoj de profesoroj Glossop kaj Gobbo bone kaj rapide videblas en okcidento per normala interreta konekto, tamen ankoraŭ nekonate al mi estas ĉu la kurso de profesoro Wandel facile videblas tie. Ĉu vi, kara leganto, se vi loĝas ekster Eŭropo, povas kontroli la kursojn de Amri Wandel ĉe www.universitato.info? Similprobleme, la kursoj de Glossop kaj Gobbo sur la serviloj de *Vimeo*, *Youtube* kaj *Ipernity* malfacile rigardeblas en Ĉinio. Eblas utiligi *Ipernity* por rigardi la lecionojn, sed la rapideco estas nekontentiga. Se estas homoj en Eŭropo, aŭ homoj en Azio, kiuj volas kontribui al la plibonigado de la Universitato de Esperanto, bonvolu sciigi tion al ni. Speciale bezonataj estas volontuloj, kiuj pretas enretigi la kursojn sur la servilojn en okcidento kaj en oriento.

La dosieroj de la lecionoj estas grandaj, ĝis 2 GB por unu duhora leciono. Tamen, mi povas persone doni kopion de la prilaboritaj lecionoj de Amri Wandel (*Enkonduko al astronomio kaj astrofiziko*) al iu en Eŭropo kaj tiumaniere ni povas daŭrigi la taskon enretigi la kursojn por ĉiuj en la tuta mondo. Simile, mi povos preni kopion de la surretaj kursoj de *Alfronti militon* kaj *Filozofio kaj historio de la informadiko* kaj redoni ilin al amiko en Ĉinujo por enretigo en Azio.

Aldone, se eventuale vi mem volas kontribui al la plibonigado de la projekto Universitato de E-o, vi povas kontakti nin per la retadresoj en la retejo www.universitato.info. Bonvolu antaŭ ol voluntuli, bone informiĝi pri la projekto per la detaloj sur la retejo. Ni pensas pri helpotaskoj kiaj la finpreparado de la libroj de prof-roj Glossop kaj Gobbo, ekzemple. Redaktado, forigado de gramatikaj eraroj, plibonigo de stilo ktp. eble bezonatas. Ni ankaŭ pensas pri al aldono de subtekstoj aŭ subtitoloj por helpi klarigi la filmojn (estis ofte malfacile en Ĉinio trovi la ĝustajn ilojn kaj lokojn por registri). Mi mem speciale pensas pri bibliotekisto kiu havas

bonajn sciojn pri biblioteko-scienco por pluplani logikan kaj koheran kolekton da libroj kaj ligiloj por komplementi la kursojn de la Universitato de Esperanto. La Universitato de E-o estas malgranda, sed interesa projekto, kiu povas disvolviĝi iom post iom. Mi mem ŝatas rigardi la lecionojn kaj lerni pri temoj, kiujn mi ne konas, kaj se la instruolingvo estas E-o, tio estas duobla plezuro.

Dennis KEEFE, Universitato de Nankino, Ĉinujo

Angla lingvo perfortas ĉinajn lernantojn (I.)

在第46届ILEI 国际大会上的报告 (2013-7-15, 德国)

Prelego en La 46a ILEI- Konferenco (2013-07-15, Germanio)



Celante reformadon, malfermiĝon kaj facilan komunikon inter Ĉinio kaj fremdlandoj, antaŭ 30 jaroj la ĉina centra registaro lanĉis sistemon instrui la anglan lingvon al ĉiuj lernantoj en la lando. Ĉinio vere bezonas la anglan lingvon kaj talentulojn de la angla lingvo, sed la registaro perfortas ĉinajn lernantojn per la angla lingvo, tro devigante ĉiujn lernantojn en ĉiuj lernejoj deinfane lerni la anglan lingvon kiu eble neniam rilatas kun la lernantoj

dum la tuta vivo. La lernigo tute kontraŭas la deziron de la ĉinaj popoloj. La saĝa kaj ĝusta vojo estas tio, ke oni instruu la lingvon al interesiĝantoj el la lernejoj, al malmultaj partoj de la lernejoj, eduku specialajn elstarulojn de la angla lingvo, kaj permesu al la lernantoj libere elekti lern-taskojn vere utilajn kaj interesajn por ili.

I. La sistemo kontraŭas la volon de multaj ĉinoj

En Ĉinio ĉiuj lernantoj devas lerni la anglan lingvon sendepende de sia volo aŭ bezono. Oni povas facile trovi el malpli-ol-30-jaraĝaj junuloj

multajn, kiuj neniam lernis fizikon, kemion, biologion, arton, ĉinan kulturon ktp, tamen oni ne povas trovi tiujn, kiuj ne lernis la anglan lingvon, kvankam multaj rapide redonis la lingvon al siaj geinstruistoj tuj post la diplomiĝo- forgesis la tuton!

Se junuloj ne lernus anglan lingvon en ĉinaj lernejoj, ili ne rajtus viziti bonajn lernejojn; se ili ne bone lernus la lingvon, ili kompreneble perdus la eblon eniri en altlernejojn. Studentoj malsukcesintaj en la angla ekzameno universitata ne povas glate diplomiĝi, kaj daŭre studi por magistriĝo kaj doktoriĝo, ricevi bonajn postenojn post diplomiĝo, malgraŭ ke la lingvo eble ne utilas en la tuta vivo. Eĉ tiuj kies fakoj estas ĉinaj tradicia kulturo, ideografio, ĉina pralingvo, ĉinstila medicino, ne havos brilan estontecon, se ili ne diligente lernas la anglan lingvon.

Fakte amasoj da anglaj lernintoj en Ĉinio ne rilatas kun la angla lingvo dum la tuta vivo. Multaj ĉinoj bedaŭre plendas: kial ni diligente lernis en lernejoj la anglan lingvon, kiun ni neniam uzis en la laboro, kaj se ni ne pene lernus la lingvon, ni ne povus ricevi ĉi tiujn postenojn? Kial oni perforte lernigas nin per la angla lingvo? Ni certe lernus, se ni vere bezonus la lingvon. Ĉu tio ne estas perforto al ĉinaj lernantoj! Angla lingvo ŝajne estas ilo por perforto.

II. La sistemo vane lernigas multajn lernantojn

Ekde elementa lernejo lernantoj elspezis karan lerntempon al la angla lingvo, senĉese parkerigis la novajn vortojn kaj gramatikaĵojn. Nun la instruado de la lingvo komenciĝas en infanĝardeno. Ekde kelkjaraĝo ĝis pli-ol-20-jaraĝo en lernejoj, oni elspezis duonon da eksterleciona tempo, kaj du trionojn da matena legtempo por lerni ĝin, kio ne apartenas al ĝi. La gajaj, senĉagrenaj jaroj en flora sezono, estas terure perfortataj de la angla lingvo!!! Eble iuj dirus, ke vi ne lernu ĝin. Ĉu tio estas permesata? Tute ne! Male, vi ne rajtas eniri en lernejojn bonajn, eĉ malbonajn.

Ĉiuj lernantoj en Ĉinio, devige elspezas multajn tempon, energion, monon kaj materialojn por lerni ĝin. Kaj 99% de la diplomiĝintoj en la lernejoj neniam uzis ĝin post la enposteniĝo, kaj plene forgesis la tuton post kelkaj jaroj. Ili elspezas fakte la junecon, la vivon de la junaj generacioj. La plej kara tempo dum la homvivo estas la juneco. Mi kredas, ke iuj lernantoj vere ŝatas la anglan lingvon, kaj uzos ĝin en la venontaj vivo kaj laboroj. Sed

multaj el la ĉinaj lernantoj elspezinte la junan aĝon, lerninte la ĉinstilan silentan anglan lingvon [t.e. nur legadon kaj skribadon], celas nur glate trapasi la ekzamenon. Tempo estas vivo. La vivo estas elspezita!

Mia filino nun flue parolas la anglan lingvon. La kialo ne estas tio ke ŝi devige kaj sisteme lernis la anglan lingvon de la infanaĝo en Ĉinio. Ŝi perfektigis la lingvoscipovon fakte en universitato de Britio post la diplomiĝo en Ĉinio. Ŝi ŝatis kaj diligente lernis la anglan lingvon en elementa kaj meza lernejo ĝis universitato. Ŝi studis en angla-lingva fakultato de konata universitato de Ĉinio. Sed ŝi konfesis, ke la flueco de la angla lingvo ne superis tiun de la internacia lingvo Esperanto. Antaŭ eniro al universitato de Britio ŝi ne kapablis flue paroli 40 minutojn kun anglaj parolantoj, kaj kapablis flue interparoli en Esperanto kun mi 4 horojn tiam, kiam ŝi lernis E-on 6 monatojn. Ŝi lernis ĝin en BEK-kurso de la usona Esperanta instruisto s-ro Dennis Keefe. Li fondis la E-an kurson en Hainandao en Ĉinio dum januaro 2010. Komparante la Esperantan nivelon de la kurso de s-ro Dennis Keefe kun tiu de ĉiuj anglaj lernintoj/antoj en Ĉinio, mi vere hontus pro la fuŝa anglalingva instruado en Ĉinio dum jardekoj, se mi estus la ĉina eduka ministro.

III. La sistemo malhelpas progreson de Ĉinio

La homaro havas diversajn denaskajn talentojn kaj interesojn. Ne ĉiuj posedas talentojn pri lingvo. Iuj interesiĝas pri arto, iuj pri komputila softvaro, iuj pri sporto, kaj iuj eble pri ĉina literaturo ktp. La postulo de eduka ministerio, ke ĉiuj lernantoj posedu la anglan lingvon, certe limigas la kreskon de diversaj talentoj kaj denaskaj interesoj. Perforta lernigo al tiuj, kiujn malinteresis la angla lingvo, certe subpremas junularan ŝatadon al diversaj aferoj. La denaskaj talentoj en diversaj fakoj eble retiriĝos pro longtempa subpremado fare de la eduka ministerio.

Homa energio estas limigita. Unu homo ne povas sukcesi en ĉiuj fakoj. Sukcesuloj elstaras ordinare en nur unu fako. Se oni metus elstarulojn el unu fako en aliajn fakojn, iuj el ili eble sukcesus, sed multaj el ili ne sukcesus kiel en la propra fako. Ne malmultaj lernantoj kun specialaj talentoj en specialaj fakoj perdis la bonŝancon viziti universitaton, kaj labori en esploro de la ŝatataj fakoj pro malsukceso en anglalingva ekzameno. Ili devas obei al la angla lingvo, forlasante siajn specialajn talentojn kaj interesojn. Oni plendas, ke Ĉinio ne havas pintajn homojn en

multaj fakoj. La angla lingvo estas la ĉefa kialo. La junuloj devige ĵetas sin en lernon de la angla lingvo, forlasante siajn plaĉojn kaj aliajn eblojn.

Nun scienco en okcidentaj landoj rapide progresas. Neniu el Ĉinio kun pli ol 1,3 miliardoj da civitanoj ricevis la Nobelpremion antaŭ 2012. Oni eltrovis diversajn kialojn pri tio. Mi opinias, ke la perforta anglalingva lernigo detruis eblajn nobelpremiojn ekde la infaneco. Sola floro ne signifas printempon, kaj abundaj floradoj simbolas printempon. En amasaj arbaroj libere kreskas diversaj arboj, el kiuj arboj estas etaj kaj arbegoj estas altaj. El la du specoj konsistas bela arbaro. Oni ne povas nuligi unu specon kaj restigi nur alian specon. Tio detruus la belan sistemon de arbaro. Belaj jadoj kun diversaj formoj kaj koloroj estas skulptitaj laŭ naturaj koloraj linioj. Troa sameco ofte detruas la naturan valoron. Same kiel natura afero, nia eduka sistemo detruas specialajn talentojn de diversaj lernantoj. De kie alvenos nobelpremioj?

IV. La sistemo detruas la manĝobovlojn de multaj homoj

Mi ne kontraŭas la anglan lingvon, mi subtenas instrui la lingvon en Ĉinio. Sed la angla lingvo estas nur ilo, kaj ne baza scio kiel la nacia lingvo kaj matematiko. Laŭ mi tiuj, kiuj lernis la anglan lingvon, devus plene posedi la lingvon, devus facile perlabori sufiĉan salajron per la lingvo. Kaj tiuj, kiuj ne deziras lerni ĝin, povus plenenergie kaj senĝene lerni sian ŝatantan fakon, perlabori panojn per la fako. La lastaj povus dungi la anglajn specialistojn servi por ili, aŭ peti servon el la antaŭaj. Do ĉiuj bone havos siajn proprajn manĝobovlojn per la ellernitaj fakoj.

Kaj nun ĉiuj ĉinaj lernantoj lernas la anglan lingvon, sed preskaŭ ĉiuj ne bone posedas ĝin. La malbonaj lernantoj donas al profesiaj lingvaj lernintoj malbonajn lingvajn etosojn. Pro tio multaj ĉinoj, eĉ diplomitoj el la angla fakultato de universitato kredas, ke ĉinoj ne povas bone ellerni la anglan lingvon en Ĉinio. Ĉinio vere bezonas altnivelajn anglalingvajn studentojn, sed multaj studentoj el universitato ne povas trovi laborojn. La kialo estas tio, ke tiuj kiuj ne bone lernis la anglan lingvon, detruas la manĝobovlojn de profesiaj anglaj tradukistoj. Lernejoj ne donas al siaj lernantoj perlaborajn kapablojn, kaj ordonas ĉiujn lerni alinacian lingvon, kun la celo levi la kulturan nivelon de ĉinaj popoloj per instruado de angla lingvo. Tio estas la plej stulta ago en la mondo.

(daŭrigota)

HUANG Yinbao,,Trezoro” (Ĉinio)

Benino

Seminario por instruista trejnado okazis kadre de tutlanda Kongreso

De la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto 2013 okazis en urbo Lokossa, departemento Mono, sudokcidente de Benino, la tria benina Kongreso de E-o en kiu estis seminario cela al instruista trejnado. La aranĝon kunorganizis la Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE) kaj ĝia instrufako, ILEI-sekcio. En ĝi partoprenis 33 esperantistoj.



Seminarianoj en Benino

Kvina Afrika Kongreso de Esperanto

Ĝi okazos en Kotonuo, Benino, ekde la 29a de decembro 2013 ĝis la 4a de januaro 2014. Ĉiuj informoj troviĝas en la retpaĝoj de Afrika Komisiono de UEA, kiu organizas la eventon kunlabore kun Benina E-Asocio (ABeE) kaj Scio Sen Bariloj (SSB), svis-benina Ne-Registara Organizo. Pripensu pri partopreno en tiu grava evento, kiu ebligas al la kongresanoj konatiĝi kun Afriko kaj sperti E-an etoson kun niaj afrikaj gesamideanoj. Ĝuu Novjaron

en varma klimato! Pripensu pri subteno de alveno de afrikaj e-istoj, kiuj ne povas atingi niajn kongresojn en Eŭropo ĉar la ŝtatoj rifuzas al ili vizon. Por subteni ilian alvenon al Kotonuo, bv uzi la UEA-konton *assb-k*, temas pri la konto de „Scio Sen Bariloj”. La retpaĝo de Afrika Komisiono de UEA estas www.esperanto-afriko.org.

*Mireille GROSJEAN,
kasisto de SSB kaj kasisto de Kongresa Organiza Komitato (KOKo)*

Ĉinio

Nia estimata amiko s-ro Augusto CASQUERO el Hispanio venas al Ĉinio du fojojn jare en printempo kaj aŭtuno. Ĉiufoje li restas en Ĉinio 3 monatojn kaj instruas E-on ĉiu-sabate senpage. Ĉi-jare li venas al Ĉinio je la kvina fojo. 2013-06-15 la ceremonio por la disdonado de diplomoj al la lernantoj okazis en la E-kursejo Ĉen Zja Ci, Kantono, Ĉinio. La estraranoj de la E-Asocio de Kantono s-roj LIN Liyuan kaj YE Petro ĉeestis la ceremonion. Ili sincere dankis al s-ro CASQUERO pro lia senegoisma laboro por E-o kaj al ĉina popolo, kaj kuraĝigas la junajn gelernantojn lerni kaj uzi E-on per pli grandaj strebadoj.



Petro YE

Finnlando



La **somera E-kurso en Finnlando** estis ĉi-jare julie aranĝita kunlabore kun E-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ELFI, la landa asocio E-Asocio de Finnlando kaj de la loka societo, E-societo Antaŭen el Tampere. La kurso okazis en la urbo Orivesi, 45 km de Tampere, do en la suda mez-Finnlando.

En ĝi partoprenis 13 kursanoj, kursestro kaj instruisto. Unu kursanino venis el Svedio.

Nin instruis la talenta, vigla kaj gaja Dalia PILECKIENĖ el Litovio. Ŝi multe paroligis nin kaj aldone ekzercigis nin en pluraj malfacilaj gramatikaj punktoj. Tre, tre interesa estis ŝia prelego pri la litova lingvo, kiu ŝajnas esti egale komplika kiel nia finna lingvo.

Ni esperas havi la eblon ankaŭ sekvontsomere fari kurson en la sama loko.

Sylvia HÄMÄLÄINEN, kursestro, sekciestro

Hungario



Inter la 30a de junio kaj la 7a de julio en la urbo Nyíregyháza-Sóstó (en la nordorienta parto de Hungario), okazis la 3a **Internacia Junulara Lingvotendaro** en Hungario, kiun organizas ĉiujare HEA. Ĝin partoprenis pli ol 40 personoj el 6 landoj (el Hungario, Koreio, Pollando, Rumanio, Slovakio, Hispanio).

Dum la malferma vespero, salutis la partoprenantojn i.a. Stefan MACGILL, la iama prezidanto de ILEI, kaj Imre SZABÓ, la prezidanto de HEA.

La lingvo-tendaro situis en bela ripozejo de la urbo, kie la loka Verda Stelo Esperanto-Societo zorgis pri la partoprenantoj.

En la grupo de komencantoj instruis s-ro Stano MARČEK (Slovakio), la progresantan grupon gvidis Rafaelo MATEOS (Hispanio). Tre plaĉis al la partoprenantoj ankaŭ la prelegoj de d-ro Gábor MÁRKUS, kiu parolis pri siaj vojaĝoj en la aziaj landoj.

Post la fino de la semajno okazis ankaŭ prov-ekzamenoj, kiujn partoprenis pluraj kursanoj.

Enikő ZENGŐ SEREGHY, ĉeforganizanto de la tendaro

DR Kongo

Kunveno en okcidenta Kongo

Komence de aŭgusto okazis tuttaga kunveno kun informado al la publiko, ludoj, konkursoj, deklamado, dancado por la partoprenantoj. Laŭ raporto la fakto, ke membroj de diversaj kluboj kunvenis, kreskigis la motivadon de ĉiuj. Agrabla etoso fortigis kaj ĝojigis la partoprenantojn.



Nepalo

Grava prelego pri E-o en internacia seminario

Okazis internacia seminario organizita de la Asocio de Nepalaj Instruistoj de la Angla Lingvo (NELTA), en kiu reprezentantoj el pli ol 30 landoj kunvenis. En la 18a de februaro 2013 Maya RAI kaj mi prelegis pri jena temo: kiel E-o helpas lerni eŭropajn lingvojn.

Ni prezentis la alfabeton, vortformadon, vortordon kaj gramatikon de E-o, komparante ilin kun la angla kaj provis konvinki la ĉeestantojn, ke, se oni lernas E-on, ankaŭ tio certe helpas pli rapide lerni la anglan aŭ iun alian eŭropan lingvon. La fakto estas tio, ke por azianoj ambaŭ lingvoj estas fremdaj, kaj la malfacileco kaj mallogiko de la angla malkreskigas la motivadon lerni la anglan, kaj ofte oni lernas ĝin nur devigite. Mi donis ekzemplon prezentante la situacion de du aziaj esperantistinoj, Natura el Koreio (mi ne scias ŝian korean nomon) kaj Indu TAPALIYA el Nepalo. Ili ne povas komuniki per la angla, kvankam ili lernis ĝin multjare. Malsukcesinte lerni la anglan, Natura provis lerni E-on kaj sufiĉe bone sukcesis. Esperanto ludas rolon de pontlingvo. Homoj sentas kontenton, ĉar post malmulte da tempo ili povas facile komuniki kun fremdlandanoj.

Por azianoj la alfabetoj de ambaŭ lingvoj estas fremdaj. Esperantaj vortoj foje similas al anglaj, ekzemple rivero, tablo kaj birdo. Se oni lernas la anglan post E-o, oni tuj komprenas multajn vortojn. Mi eklernis la francan antaŭ 20 jaroj, post E-o, kaj mi komprenis multajn vortojn tuj, post kiam la instruistino elparolis ilin. Mi pli facile trapasis la unuan nivelon kompare kun miaj samklasanoj. Nuntempe oni povas komuniki per Interreto, ekzemple per Fejsbuko, kaj ricevi helpon en la lernado de E-o, ĉar e-istoj estas tre helpemaj kaj kuraĝigemaj. Se iu esperantisto volas lerni la nepalan kun mi, mi estas preta helpi lin aŭ ŝin. Se iu francalingvano petus la saman helpon, mi ne farus tion. Alia grava afero estas, ke E-o estas logika - preskaŭ ne ekzistas gramatikaj esceptoj - oni dum lernado eĉ povas per logiko krei novajn vortojn. Ekzemple, por krei vorton, kiu indikas ineksan estaĵon, ni uzas la sufikson „in”: kato – katino, viro – virino, kaj en la angla oni foje aldonas „ess” por krei ingenran vorton - ekzemple, host- hostess, lion- lioness, sed tiu ĉi regulo ne ĉiam funkcias! Ekz. oni ne povas krei *bullness*, *heroess*. Se iu lernas la anglan post E-o, li aŭ ŝi tuj povas trovi

vortojn, kiujn oni povas logike krei, ĉar oni jam lernas fari tion surbaze de la E-regularo.

Ni instruis kiel krei vortojn kaj ankaŭ prezentis simplajn gramatikaĵojn de E-o. Ĉeestantoj post la prelego starigis demandojn kaj ni respondis laŭ niaj kapabloj. Multaj el ili ne sciis pri E-o antaŭe kaj nun planas lerni ĝin. Ni esperu, ke kelkaj el ili lernos nian lingvon. E-o ne staras kontraŭ iu ajn lingvo inkluzive la anglan. Fakte oni povas lerni ĝin por pli bone lerni eŭropajn lingvojn. Oni ne devas pensi, ke la lingvo nepre kreos belan mondon, sed ĝi certe taŭgas kiel pontlingvo por lerni aliajn lingvojn.

La prezentado daŭris 50 minutojn. Povas esti, ke por e-istoj nia prelego ne entenis novajn informojn, sed por personoj, kiuj ne sciis pri la ekzisto de tia pontlingvo kia Esperanto, ĝi ŝajne estis efika, kaj ni estas feliĉaj, ke ni alparolis pli ol 40 ĉeestantojn el diversaj landoj.

Bharat GHIMIRE, estrarano de ILEI

Nikaragvo

Inform- kaj instruvojaĝo al Nikaragvo 2013

Duan fojon en 2013 okazis inform- kaj instruvojaĝo al Nikaragvo, danke al la subteno de la fondaĵo Esperanto Internacia. Surloke min subtenis Uriel Gurdíán, kiu instruas Esperanton en UNAN (Universitato Nacia Aŭtonoma de Nikaragvo). De la 6-a ĝis la 24-a de januaro 2014 okazos intensaj kursoj en UNAN, kiuj estas malfermaj ankaŭ por eksterlandanoj laŭ la stilo de NASK en Usono kaj Esperanto-insulo en Ĉinio. Tuj post la kursaro okazu la 1-a Esperanto-kongreso en Nikaragvo (internacia), kiun ni planas organizi en la turisma urbo Granada.

Martin SCHÄFFER

Orienta Timoro

Enkonduki Esperanton en nova lando

En la unua tago de mia oktaga restado en Orienta Timoro, lando kie laŭ mi antaŭe neniam iu lernis E-on, mi vizitis la oficejon de la nacia radio kaj petis intervjuon, kiun mi ricevis post sufiĉe longa interbabilado kaj argumentado. Post la intervjuo la prezentistoj de la radio interesiĝis kaj estis decidite, ke mi instruos al ili E-on ekde la sekva tago. En la sama tago



mi intervjuiĝis ĉe la gazetoj *Timor Post*, *Diário kaj Independente*. Survoje al la tria gazeto mi ekvidis la oficejon de la nacia junularkonsilio, eniris kaj la rezulto estis, ke mi du fojojn instruis ankaŭ tie.

En mia dua 'labortago' mi intervjuiĝis ĉe la kvara granda gazeto de la lando, *Suara Timor Lorosae*. Ĉiuj kvar gazetoj aperigis artikolon pri Esperanto. En *Independente*, kies direktoro mem interesiĝis pri la lingvo, aperis foto de la lasta leciono ĉe la nacia radio. Mi verkis pri tiu semajno taglibro-

forman raporton, kiu ne nur temas pri E-o.

Por legi ĝin kaj por spekti fotojn pri mia agado kaj pri la lando mem konsultu la paĝon www.sites.google.com/site/esperantoenorientatimoro/instruvojaghoj/unua. Vi trovas en la menuo tie ankaŭ ligilon al la kvar gazetartikoloj kiuj aperis.

Mia restado en Orienta Timoro okazis meze de mia kvina por-Esperanta vojaĝo en Indonezio. Mia sekva vojaĝo al Azio fokusiĝos plejparte al tiu malgranda lando kaj okazos somere 2014.

Pliaj novaĵoj pri tio sekvos poste kaj legeblas en la supra retejo.



Heidi GOES (Belgio)

Pollando

De Esperanto ĝis gloro: Honore al poeto TUWIM

„Julian Tuwim – de Esperanto ĝis gloro” - tia estis la temo de la 33a Pola Esperanto-Kongreso, kiu okazis inter la 28a kaj 30a de junio 2013 en Lodzo (Łódź) kaj kiu estis dediĉita al la pola poeto Julian TUWIM, kiu naskiĝis en tiu urbo kaj estis ankaŭ esperantisto. Julian TUWIM (1894-1953) komencis sian literaturan karieron esperantigante la polan poezion de alia pola eminenta modernisma poeto, Leopold STAFF. Li debutis en *Pola Esperantisto*, kun kiu li kunlaboris dum kvar jaroj (1911-1914) tradukante ankaŭ verkojn de aliaj polaj poetoj. Poste li verkis pole siajn proprajn poeziaĵojn, sed li neniam esperantigis ilin.



33-a PEK, Lodzo, Pollando, 28-30.06.2013, foto A. Sochacki

Pro tio multaj programeroj dum la Kongreso estis dediĉitaj al liaj vivo kaj verkado. Precipe interesa estis la prelego „Lodzaj adresoj de Julian Tuwim” farita de Ryszard Bonisławski, senatano kaj lodza ĉiĉerono. Okazis ankaŭ promenado tra la urbo laŭ la spuroj de Tuwim, koncertoj de kanzonoj de li verkitaĵoj. Liajn versaĵojn por infanoj prezentis en E-o lernantoj de la 199a bazlernejo je la nomo de Tuwim en Lodzo. Speciale por la Kongreso la

Pola Sekcio de ILEI eldonis poemon de Tuwim „Balo en opero” (*Bal w operze*), esperantigitan de Lidia LIGEZA kun redaktado kaj postparolo de Tomasz CHMIELIK, grafikaĵoj de Marta RAK-PODGÓRSKA. Porokaza kongresa bildkarto prezentas ankaŭ la poeton. La ĉefa urba biblioteko en Lodzo organizis interesan ekzpozicion pri la vivo kaj verkado de Tuwim kaj pri la historio de la E-movado en la kongresa urbo.

La ĉefa organizanto de la Kongreso estis Robert KAMIŃSKI – estro de la lodzaj e-istoj, samtempe sekretario de Pola E-Asocio kaj ankaŭ de la Pola Sekcio de ILEI.

La prezidanto de ILEI-Pollando, Tomasz CHMIELIK, prezentis du prelegojn – pri Tuwim kaj Lodzermensch, d-rino Ilona KOUTNY (membro de ILEI-PL) gvidis seminarion pri edukado kaj invitis partopreni la instruistan trejnadon okazontan ekde septembro, kadre de la Interlingvistikaj Studoj en Poznana Universitato. La kongresa programo estis riĉa. Amikeca etoso regis dum la Lodza Kongreso, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 120 personoj el diversaj landoj.



Gizela SKLORZ kaj Magdalena TATARA – Pola Sekcio de ILEI

Rusio

En Sankt-Peterburgo kadre de 5-a Internacia Scienca Konferenco pri „Aktualaj problemoj de filologio kaj metodiko de instruado de fremdaj lingvoj”, kiu okazis en la filologia fakultato de la Ŝtata Polusa Akademio la 20-an kaj la 21-an de februaro 2013, Svetlana MIROŝNIĈENKO, docento, faris raporton unue pri E-o tra la mondo kaj due pri komparo inter la franca kaj E-o, kiu helpas lerni pli bone la francan. La interesa raporto konatigis kun la *Lingvo Internacia*, kio kaŭzis viglan intereson inter geinstruistoj pri fremdaj lingvoj. La nova malbone konata temo enportis „freŝan” flueton en sciencan medion de la konferenco kaj ebligis konatiĝi kun E-o kiel lingva fenomeno.

Svetlana MIROŝNIĈENKO

Sud-Afriko

Nova sekcio en Sud-Afriko

La Komitato de ILEI aprobis dum la Konferenco en Herzberg la aliĝon de nova sekcio de ILEI en Sud-Afriko. Ĝi estas la 35a. Statuto alvenis ĝustatempe, ĝia enhavo bonordas, membrolisto vidiĝas, ĉio estas en ordo. Ni gratulas! Post la anonco de tiu decido la Estraro ricevis jenan retmesaĝon el Kaburbo:

„Kara Mirejo kaj la Estraro,

Mianome kaj nome de nia nova ILEI-Sekcio en Sud-Afriko mi tutkore gratulas kaj dankas la Komitaton de ILEI pro la akcepto de nia ILEI-Sekcio. Al vi, Mirejo, mi deziras sukcesplenan mandaton kape de ILEI. Mi kun aliaj promesas subteni nian Ligon en la efika instruado de Esperanto en Afriko. Mi kredas, ke per via efikeco mia plano disvastigi Esperanton en kelkaj landoj sude en Afriko (Sud-Afriko, Namibio, Zimbabvo, Bocvano, Lesoto) konkretiĝos.

Sukcesplenan Prezidantecon!

Via amiko kaj samideano Emile MALANDA”

Urugvajo

En Urugvajo oni jam prepariĝas por nia ILEI-Konferenco en 2014 en Montevideo. Jen tio, kion ni trovis en „Folio... sen nomo” (informilo de Urugvaja E-Asocio), bv legi pri tiu helpopriskribo ne nur en rilato kun preparo de Konferenco, sed ankaŭ por subteni la laboron de via Landa Asocio kaj/aŭ de via ILEI sekcio:

„Ankaŭ vi povas partopreni en la preparlaboroj por la ILEI-konferenco de 2014 en Montevideo. La laboroj antaŭeniras kaj vi povas partopreni, eĉ se vi ne havas tempon. Serĉu en via tempoplana kajero unu tagon dum la venonta monato, kiam vi povos disponigi nur 2 horojn por E-o. Tio sufiĉas. Kion vi povus fari? Kontaktu la LKK-on por elekti unu specifan taskon por fari.

Ĉi-numere ni montros 3 ekzemplojn, kaj aliaj ideoj venos en venontaj „folioj”. Ekz., vi povas kontakti turismagentejon por ekscii pri eblaj vojaĝoj/promenadoj duon- aŭ tuttaga ene aŭ ekstere de Montevideo, kaj


informi nin pri la detaloj kaj prezoj. Aŭ eble vi povas kontaktigi nin kun institucio interesata partopreni en la ILEI-simpozio, aŭ vi povas informi pri la evento al unu amaskomunikilo. Ni atendas novaĵojn pri vi: ues@esperanto.org.uy, 097 232 851 (Sonia), 096 831 355 (Daniel).”

Usono

NASK (la Nord-Amerika Somera Kursaro) 2013 estis grandega, kompare kun lastaj jaroj. Ni havis 43 studantojn el 13-15 landoj (kalkuloj variis). La loko, William Peace University, estis tre ĉarma kaj oportuna por ni. Mi esperas, ke venontjare ni simile altiros grandan grupon. Oni ankoraŭ ne decidis, kie la kursaro okazos, sed mi esperas, ke ĝi estos en Viktorio, Brita Kolombio, Kanado. Al Kanado oni prognozas, ke estos multe pli facile por studantoj akiri vizon ol por iri al Usono, do ni eble havos eĉ pli internacian grupon.

Derek ROFF, derek@unm.edu

Forpaso



Hermann BEHRMANN naskiĝis la 12-an de julio 1935 en Zeven kaj mortis la 29-an de junio 2013 en Bad Kissingen. Li estis germana esperantisto, instruisto kaj aŭtoro de lerniloj.

BEHRMANN studis pedagogion ĉe la Pedagogia Altlernejo en Bielefeld kaj laboris poste kiel instruisto en elementa lernejo en Paderborn. Por sia unua ŝtata instruista ekzameno, li prezentis kiel laboraĵon novstilan Esperanto-kurson, kiu fariĝis la bazo de la kurso „Esperanto Programita”.

Li fondis ĉirkaŭ la jaro 1969 Esperanto-eldonejon en Löhne. Post lia translokiĝo al Paderborn, estiĝis el ĝi la Esperanto-Centro Paderborn. Ĉi tiu centro – ĉiam gvidata de Hermann BEHRMANN – startigis la kampanjon

„Testo 5 000”: Oni serĉis 5 000 homojn, kiuj pretis „testi” Esperanton, lernante la lingvon pere de „Esperanto Programita”. (...)

Pri lia unika instru-eksperimento per lia kurso „Esperanto programita” aperis bona artikolo en la revuo *Esperanto* (12/1969). En 1995 Germana Esperanto-Asocio agnoskis liajn atingojn per meritmedalo de GEA.

Ĉirkaŭ la jaro 1998 Hermann BEHRMANN (kaj kun li la Esperanto-Centro) translokiĝis al Berlino. La Esperanto-Centro en 2003 kuniĝis kun la asocio *EsperantoLand*, kiu organizas internaciajn renkontiĝojn, vendas librojn kaj funkciigas ampleksan retejon. La retejon iniciatis en 2001 laborgrupo fondita de Lu WUNSCH-ROLSHOVEN.

H. BEHRMANN varbis profesoron Helmar FRANK por E-o kaj tion li konsideris kiel la plej grandan sukceson en la mondo de E-o. Poste BEHRMANN kaj FRANK dum pli ol jardeko kunlaboris i.a. pri la lernhelpa efiko de E-o.

Laŭ teksto el la Panteono de edukado.net. Foto: Fritz WOLLENBERG.

Reago

Kara Kolego,

Atente mi legis vian artikolon „Kiel prelegi pri Esperanto?” [vd. Miroslav HRUŠKA (Miropiro) en IPR 13/2, p. 10-14].

Estas ja tre interesa teksto, sed mi devas diri, ke mi ne tute samopinias pri unu punkto en la prezentado de E-o: paroli pri Zamenhof kaj pri la historio de la lingvo superfluas! Fakte – laŭ mi – lingvo povas esti ian intereson, nur se ĝi utilas. Pro tio mi preferas paroli pri miaj propraj spertoj en la uzado de la lingvo kun eksterlandanoj kaj eksterlande. Krome mi klopodas montri nuntempajn uzeblojn de E-o. Ne ĉiuj intencas aniĝi al E-kluboj, kie oni paroladas kaj teoriumadas pri la kvalitoj de la lingvo kaj de ĝia kreanto.

Kiam persono, kun kiu mi parolas pri Esperanto, demandas pri la kreinto, mi respondas per demando: „Ĉu vi havas aŭtomobilon? Kiu kreis la unuan?”. Fakte tiu detalo tute ne gravas, sed ja la teknikaj ecoj. Kaj oni povas kompari Esperanton kun aŭtomobilo: ambaŭ estas vehikloj (unu por

la ideoj, la alia por la korpoj); ambaŭ aperis en la sama periodo (Eo en 1887, aŭto en 1883); ambaŭ daŭre evoluis kaj estas tute malsamaj ol tiuj de la jaroj 1880. Fine mi donas la respondon: Zamenhof por la lingvo kaj Edouard Delamare-Deboutville por la aŭto.

Vi tute pravas skribante, ke „oni ne forgesu indiki E-ligilon, kiu estas facile memorebla”. Pro tio mi ĉiam mencias la paĝaron www.esperanto.net, kun klarigoj en 64 lingvoj, el kiuj la ĉefa www.esperanto.net/info/index_cs.html. Dankon pro via tre interesa raporto kaj sukcesegon al via E-agado! Kore kaj kolege via,

Germain PIRLOT (emerita instruisto, Belgio)

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj (reviziota)

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Mireille Grosjean, Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekt: Aurora Bute (gvid.), Tiekio Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrolo: Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot.

Lerneja: Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekio Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas, Stefan MacGill (Estrare: Mireille Grosjean).

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: Mireille Grosjean).

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Čížikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat.

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viŝazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net.

Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

UN (Unuĝintaj Nacioj): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*), pike-b (projekto *Interkulturo*).

* Pagoj al la sveda bankkonto: En Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 20 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leĝhandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <moerbeekr@gmail.com>.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 15-an de septembro 2013, redaktofino por la sekva numero: la 15-an de novembro 2013.



Subskriboj de la konferencanoj en Herzberg/Sieber (vd p.5)



Plantado de arbo en la 3-a IJL en Hungario (vd. p.31)

